

# BELOKA

Rakonteto de Liette Lêla



Beloka estas
ok- jaraĝa knabino.
Iam ŝi diris al sia avinjo:
- Vi estas tre teda maljunulino!



**Dirante tion,**
**Beloka ekdormis.**

Do ŝi sonĝis ke ŝi estis
maljuna
tiel kiel sia avino.
Multe da dentoj ŝi jam
ne havis. Ankaŭ ŝi jam ne
povis marŝi sole.
Sed feliĉe la fidela urseto
bone prizorgis ŝin.





**Matene, tre frue,**
**ŝi renkontis sian avinon.**

Beloka, ridetante, diris al ŝi:
Vi, karega avinjo, ne estas maljuna.
Mi, Beloka, estas
tro juna.
Vi ne estas teda.
Mi estas tro
senpacienca
kaj saltema.





**Kaj la avinjo nur ridetis amante.**


Projekto
Esperanto por Infanoj